Ĉi tiu teksto, la programteksto, estas dissendata kiel ero de la televida bildo kaj oni vidas ĝin sur ĉiuj televidkranoj.

### TELETEKSTO ESTAS IO TUTE ALIA

Oni ne intermiksi ĉi tiun sistemon kun alia teksto, la tielnomata teleteksto. Teleteksto estas sistemo, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj. Ĝin oni povas ricevi nur per specialaj televidiloj. La sistemo dissendas tekston en formo de serio da impulsoj, sendataj samtempe kun la televida programo (aŭ provbildo) dum la eta paŭzo inter du sinsekvaj bildoj. La impulsoj estas nevideblaj en ordinara televidilo (fakte oni kelkfoje povas vidi ilin kiel linio de blankaj punktoj tuj super la bildoj), kaj ili kontrolas tekstgeneratoron, kiu estas en ĉiu teletekstricevilo.

Oni povas elekti el kelkcento da informpaĝoj, kiuj povas aŭ esti tute sendependaj de la programo (ekzemple veterprognozo, trajnhoraroj kaj futbalrezultoj) aŭ ili povas aparteni al la programo (ekzemple esti traduko de la dialogo, elektebla en unu el pluraj lingvoj).

Nils-Erik Kristoferson

# Mallongaj novaĵoj el mondo teknika

## MALGRANDA FARIĜAS EĈ PLI MALGRANDA

Vi certe rimarkis, ke malpli da junuloj ĉirkaŭvagas kun grandega stereofona radiaparato, kaj pli multaj fermas sin en propran muzikan mondon per tute malgrandaj aŭskultiloj sur la oreloj. La sonbendan aparaton, kiu liveras al ili la muzikon, ili havas en la poŝo kaj ĝi estas nur malmulte pli granda ol la muzika kaseto.

Tiu malgranda aparato jam estas muzeaĵo. Nova sonbendaŭskultilo (ne eblas registri sur ĝi) jam ekzistas kaj ĝi havas la dimensiojn de la skatoleto en kiu oni aĉetas la sonbendojn; ĝi nur estas iom pli dika.

La stranga fenomeno estas, ke ĉi tiuj minimumaj aparatoj havas vere altan sonkvaliton; eĉ saltado aŭ kurado ne influas la mekanikon de la aparato.

La malgrandajn dimenziojn ebligas forigo de pluraj funkcioj, kiuj estas troveblaj en aliaj, pli grandaj aparatoj. Ne ekzistas laŭtigilo (pro tio oni devas aŭskulti per aŭskultiloj), ne eblas registri mem kaj mankas ebleco forigi kelkfoje ĝenan bazan tonon. La ĉi-lasto ne estas speciale grava, ĉar oni ne laŭtigas la sonon.

Milionoj da sonbendaparatoj miniaturaj vendiĝis dum la lasta jaro. La plia miniaturigo certe helpas al pliaj vendrekordoj.

## NORVEGOJ AVANTGARDAS KUN EKRANREGULOJ

Laborado ĉe ekranterminalo estas laciga. Tio sentiĝas unuavice en la okuloj kaj la kapo. La norvega ŝtata aŭtoritato por laborsekureco publikigis regulojn, laŭ kiuj oni rajtas labori ĉe ekrano. Ili estas certe la plej severaj en Eŭropo. Laŭ ili neniu devas labori antaŭ fosfora ekrano pli ol du horojn sinsekve sen paŭzo. Krom tio oni rekomendas, ke la laboro tuttaga enhavu nur 50 procentan labortempon ĉe ekrano. La ceteran tempon oni faru ion alian.

En Norvegio oni sufiĉe strikte

sekvas la regulojn de la laborsekureca aŭtoritato, pro tio la liverantoj de komputoraj ekranoj akre protestas kontraŭ ili.

La komputora industrio uzas argumentojn pri tempoŝparado kaj efika utiligo de la maŝinaro. Malpermeso utiligi la laboristojn ĉe la ekranoj centprocente forprenas al ili unu el la ĉefaj argumentoj.

La regularo ankaŭ precizigas normojn laŭ kiuj la ekranaĵoj funkcias: ili devas esti dividitaj, tiel ke la ekrano kaj klavaro estas individue ĝustigeblaj; ĝenaj sonoj kaj varmo devas esti minimumaj; la dungitoj ĉe ekrano devas iri al regulaj kontroloj de siaj okuloj ktp.

## KUNPORTU ORKESTRON EN VIA TEKO

Ankoraŭ unu artikoleto, kiu temas pri komputoroj, sed ĉifoje pri tute speciala portebla komputoreto.

Vi eventuale mem posedas poŝkalkulilon kaj eĉ tian, kiu eligas sonon, kiam vi premas butonon sur ĝi kaj malsaman sonon ĉe ĉiu cifero. Ĝi estas nenio speciala, tute ordinara poŝkalkulilo. Sed nun vi povos havigi al vi poŝkalkulilon, kiu estas tuta orkestro. Fakte ĝi estas unuavice muzikmaŝino. Ĝi havas pianoklavaron, kiu ampleksas pli ol du oktavojn. Vi povas do tuj ekmuziki sur ĝi. Vi povas memori al la aparato cent notojn kaj igi ĝin refari ilin. Kiam vi faras tion, vi povas elekti inter kvin instrumentoj, i.a. fortepiano, gitaro, violono. Vi povas al tio aldoni akompanion laŭ ritmo elektebla el inter deko (valso, bosanovo, sambo, svingo ktp). Vi povas balanci la akompanion tiel, ke ĝi estas pli aŭ malpli melodia. Vi povas eĉ altigi la tuton iun oktavon, aŭ malaltigi.

La muzikon, kiun vi tiel "kreis" vi povas aŭskulti tra la aparata laŭtparolilo, aŭ vi povas kupli la tuton al via hejma stereofona sistemo, kie vi ankaŭ povas registri ĝin sur sonbendon kaj reaŭdi kiam ajn.

# Ne nur leteroj de plum-amikoj (4)


## PROZO FIKCIA

Bonega enkonduko en la fikcian prozon esperantan estas la antologio *33 rakontoj* (1964), redaktita de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. Ĝi prezentas tridek tri novelojn, de dudek naŭ aŭtoroj el dek sep landoj. La unua, ĉarma noveleto de Magnus Norden-svan, siaspece eleganta kaj koncize rakontita, datas de 1898; la lasta, amhistorio milde ironia de László Böti, kun tragika, surpriza finklimakso, datas de 1961. Ĉiuj el la tridek tri noveloj estas legindaj, facile legeblaj, kaj en stiloj diversaj, pli malpli individuaj. Troviĝas noveloj seriozaj, eĉ vere tragikaj; aliaj bonhumoraj — realisme aŭ fantazie — noveloj kun fortaj, plektitaj intrigoj; aliaj pli skizaj. Sed ĉiuj estas noveloj kun veraj temoj, strukturoj, klimaksoj, stiloj. Tiuj stiloj varias de tre trafa, kristaleca simpleco de Stellan Engholm ĝis la riĉa vortostoko kaj neatenditaj parolturnoj, sed same trafa taŭgeco, de Reto Rossetti aŭ Jean Ribillard. Tiu ĉi sola volumo plene pruvas, ke jam kreigiĝis esperanta prozo tute matura kaj sufiĉa por fikciaj artoj.

Ekzistas jam lingva ilaro por altnivelaj maturaj romanoj; sed ne estas eble aserti, ke fikcia prozo en esperanto atingis jam nivelon similan al tiu de la originala poezio. Jam abundas intereseĝaj, foje artisme bonaj, rakontoj; ĉu ekzistas romanaj majstroverkoj, estas dubinde; kaj certe esperanto ankoraŭ ne havas siajn Tolstoj, Dostojevski, Dickens, Balzac, Zola, George Eliot, Henry James.

Mi jam aludis la ekonomian flankon de la malhelpoj. Pri grandskala esperanta romano ekzistas alia malhelpo: vere granda romano, laŭ modernaj konceptoj de tiu arta ĝenro, devas kredeble enhavi ian profundan psikologian esploron de pluraj individuoj, kaj samtempe iom larĝan penetradon de iu socia medio. Devas esti eksterordinare malfacile verki gravan

romanon vere taŭgan por internacia legantaro; adekvate rilatigi sufiĉe universalan mondrigardon, pli grandan ol lokaj dogmoj, al tiu amaso de lokaj, tempaj kaj precipe personaj detaletoj, kies malfortaj fadenoj teksiĝas kompleksege en la vivtapeton. Ni pensu, kiel ofte tre laŭdata romano tradukita ŝajnas tiel fremda, ke ni legas, spertante ĝin pli kiel ekzotikan kuriozaĵon ol kiel eminentan fikcion. Por verki plene memstaran kaj vere universalan esperantan romanon oni kredeble bezon-



nus ne nur geniulon kiel Balzac aŭ Henry James, sed unu el tiuj supergeniuloj kiel Ŝekspiro, kiuj tre malofte trakometas la ĉielon de iu ajn lando.

Tamen ekzistas respektinda esperanta fikciaro. La esperanta romano debutis en 1907 per la sensacia, felietoneca romano de Henri Valienne, *Kastelo de Prelongo*, kiun sekvis en 1908 lia *Ĉu li?* Sed, same kiel pri la poezio, la budapeŝta skolo multon kontribuis al arta maturiĝo de la esperanta romano. Julio Baghy restas ĝis nun unu el la plej bonaj esperantaj romanistoj: *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero*, tragikaj, emociplenaj romanoj bazitaj sur liaj propraj travivaĵoj kiel militkaptito en Siberio, estas almenaŭ pli ol fikcioj nur distraj. Inter aliaj meritoj, Baghy brile evoluigis

esperantajn konversaciajn stilojn, eĉ diverslandajn "akcentojn"; kaj kapablis vere krei karakterojn kaj emociojn. Iom malpli forta romano, iom sentimentalita, *Printempo en aŭtuno*, tamen ne estas sen psikologiaj meritoj kaj realismaj detaloj. Sed eble la plej interesa fikcio de Baghy estas surprize avantgarda romano *Hura!*, kiu miksas (foje kun neatendita iaspeca realismo, ĉar la vivo mem miksas la ĝenrojn ofte tre malbongustel) elementojn de filozofieca satiro, gajege ekstravaganca farsa satiro, sciencfikcio kaj fantazio, komiko pli realisma, seriozaj emocioj de simpatiaj homoj serioze pritraktitaj, romantika politika intrigo. Ĝi enhavas multajn vere potencajn paĝojn, tre riĉan inventaĵaron kaj, kvankam la siberiaj romanoj estas pli kortuŝaj kaj intensaj, *Hura!* estas eble ĝis nun la plej solide intelekta originala kaj interesa esperanta romano.

Baranyai verkis romaneton, *Maria kaj la grupo*, en kiu la medio de esperanta grupo estas la fono por serioza historio pri individuoj; Szilágyi kriminalromaneton iom neordinaran, *Tiel okazis, aŭ Mistero minora*, kaj Sándor Szathmári vere brilan satiran romanon, tre similan al la konata *Gulliver* de Jonathan Swift: *Vojaĝo al Kazohinio*, kiu akre trapikas la absurdecojn de homa senracieco, koncize kaj inventeme; kvankam tiu polurita verko havas la finfine neadekvatan negativismon de la satira ĝenro.

Raymond Schwartz debutis kiel romanisto per mallonga, sed bone verkita romano *Anni kaj Montmartre* en 1930, sed nur en 1962 aperis lia plej ambicia kaj serioza verko, relative grandskala romano, *Kiel akvo de l'rivero*, unu el la plej gravaj romanoj ĝis nun en esperanto. Ĝi pritraktas, ĝenerale realisme, travivaĵojn de familio, kies individuajn vivojn diversmaniere frapis la du mondmilitoj. Ne mankas la konata ŝvarca humuro, gajaj bildoj pri festoj kaj drinkado kaj simile, sed sube fluas malpli trilanta rivero, la voĉo de malpli ridema, eĉ iom sombra Schwartz, kiu vere komprenas la tragikon de homaj vivoj, kaj kiel la potencaĵo de kelkaj povas disbati la vivojn de multaj; kiuj avidas nur iom da senkulpa persona feliĉo.

Tre alispican miksaĵojn de personaj koncernoj kun politikaj motivoj oni trovas en la soveta romano de Vladimir Varankin, *Metropoliteno* (1933).

Kelkaj ŝatataj romanistoj malpli altgradaj, sed kies verkoj estas legindaj, inkluzivas Jan Fethke ("Jean Forge"), Stellan Engholm, H.J. Bulthuis, Heinrich Luyken. Eble aparte interesa estas tre originala verketo de Jean Ribillard, kiu uzas la sufiĉe oftan metodon satiri la homan vivon tra la buŝo de besto en *Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud* — simpatia kaj elokventa azeno.

Pro la preskaŭ plena manko de komercaj motivoj ĉe esperanta verkado kaj eldonado ne ekzistas en esperanto la granda literaturo nur distra kaj sensacia, kiun oni trovas en multaj nacilingvaj literaturoj. Kaj ankoraŭ ne ekzistas, ekzemple, detektivromanoj aŭ streĉromanoj je arta nivelo kaj malnaivonivelo de la plej bonaj specimenoj de tiu minora arto en, ekzemple, la angla aŭ la franca. Esperantistoj tamen komencas konscii, ke oni vere bezonas ian tian relative frivolan literaturon. Multaj homoj, kiuj ne legas altnivelajn artverkojn malfacilajn, volonte legas ion pli eskapisman, kaj por esperantistoj foje pedagogiaj aŭ propagandaj motivoj anstataŭas la komercajn motivojn de aliaj. Eble la detektivromano en esperanto komencas iom evolui. La tri detektivromanoj de Johán Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, *Ĉu li bremsis sufiĉe* kaj *Ĉu li venis trakosme?* estas bonstilaj kaj sianivela iom realismaj, kreas medion (eĉ kun propra dialekto, kiu havas specialan funkcion en la intrigo) kaj havas iom da psikologio.

La esperanta novelo estas iom pli larĝe kaj bone evoluinta ol la ĝisnuna romano, verŝajne grandparte pro la menciitaj ekonomiaj motivoj. Estas eble signife, ke *Plena ilustrita vortaro* (1970) jam difinas "novelo" ("mallonga literatura verko, skizanta per karakterizaj trajtoj fakton de la vivo, econ de karaktero ks"), kun aludo al kondensado kaj al majstroj alilingvaj de la novelo, tiel ke klare temas pri eble altnivela artverko; sed ke la difino de "romano" ankoraŭ iom emfazas la pli eskapisman kaj sensacian aspekton de tiu artformo, kaj ne

mencias la plej altajn kriteriojn de la arta romano grava.

Inter fruaj esperantaj novelverkistoj ne malestimindaj troviĝas Jeanne Flourens ("Roksa-no") kaj, pli bona, Ivan Ŝirjaev. Denove elstaris la budapeŝta skolo: Julio Baghy restas unu el niaj plej eminentaj novelistoj, kaj same bone prezentas la komikon kaj tragikon de la vivo, socian proteston aŭ psikologion de amaj tenoj. Liaj kolektoj estas: *Dancu marionetoj!*, *Migranta plumo*, *Koloroj*. Ferenc Szilágyi debutis kiel novelisto per milde satiraj, ŝerce modernigitaj fabeloj en *Trans la fabeloceanon*, kiu ankoraŭ enhavas pli ambiciajn novelojn kaj tre amuzan karikaturan fantazion pri la personoj de la budapeŝta skolo. Pli kompleksaj estas kelkaj liaj noveloj en la kolektoj *La granda aventuro*, *Inter sudo kaj nordo*



kaj *Koko krias jam!* Raymond Schwartz verkis bonajn variajn novelojn, kolektitajn en *Vole ... novele*. Menciindaj estas la egiptofonaj noveloj de L.N.M. Newell en *Bakŝiŝ* kaj la satiraj noveletoj de Forge en *La verda raketo*. En la novelaro *Se grenereto ...* K.R.C. Sturmer ("Kernelm Robinson") realisme kaj kortuŝe portretas, inter aliaj temoj, la internan vivon de lernejknabo.

Ankaŭ la skota skolo valore kontribuis al la esperanta novelarto. Elstara novelisto estas John Francis, kies kolekto *Vitralo* enhavas, inter aliaj bonaj noveloj, kelkajn brilajn satirajn novelojn pri fantazia regno de Juglando, kun seka ironia humuro, bele trafaj rapidaj frapoj kaj multa inventemo; kaj eble unu

el la plej vere potencaj noveloj ĝis nun verkita en esperanto, la neforgesebla *Gerموj en rikolto*, kiu montras, tra la etaj kruelaĵoj kaj amuzoj de kelkaj knaboj, la neraciecon, kapricemon kaj sencelan kruelecon de ni homoj. Reto Rossetti, en *El la maniko*, verkas kortuŝe, skizante realisme pecetojn el la vivo aŭ ellaborigante komplikajn historion malpezan aŭ tragikan, sed ĉiam per stilo virtuoze elpensita kaj tre persona. Ankaŭ Marjorie Boulton verkis novelojn, kolektitajn en *Okuloj*.

La satiraj noveloj de Szathmári, kolektitaj en *Maŝinmondo*, ne atingis la famon de lia romano, sed meritas atenteman legadon. John Hammond Rosbach estas ĉefe novelisto kaj liaj kolektoj *Bagatelaro*, *Homoj kaj riveroj*, *La mirinda eliksiro* kaj *Disko*, kvankam ne tiel frape elstaraj, kiel tiuj de, ekzemple, Francis aŭ Baghy, estas legindaj kaj bonstilaj. Inter aliaj novelistoj menciindaj estas: Mason Stuttard, R.J. French, Julia Pióro, Ŝtefo Urban, Andreo Szabó, Bertram Potts, Ueyama Masao, Konisi Gaku. Aperis tra la esperanta gazetaro sufiĉe multaj unuopaj noveloj ne malbonaj.

Kaj la simpatia fiverkisto Louis Beaucaire daŭrigis sian profandan laboron per novelaro *El la vivo de bergvala sentaŭgulo*, gaje cinikaj kaj sprite senpietataj rakontoj pri seksaj aventuroj en esperantista medio. Kvankam liaj ekzemploj por la vivkonduco estas de tre duba valoro, lia uzado de esperanto estas brila, kun multaj lertaj aludoj kaj, inter aliaj priesperantaj ŝercoj, ĉarmaj citaĵoj el la *Fundamento de esperanto*, rilate al kuntekstoj, al kiuj Zamenhof nepre ne destinis ilin. Lingvo devas enhavi tre viglan vivon, por ke oni tiel ĝoje kaj ĝojige misuzu ĝin.

Morale pli malbonaj, laŭ mia morala sento, estas tiuj multaj verkoj en esperanto, kiuj estas mallarĝmensaj kaj unuflankaj, dogmigaj kaj malamoplenaj, propagandaj de totalismaj registaroj. Mi sentis fortan tenton klasifiki ilin sub nia nuna titolo de *prozo fikcia*; sed, kvankam ja ne temas pri prozo malfikcia, mankas ĉe ili la interesigaj artoj kaj la sentemaj perceptoj, kiujn oni atendas ĉe arta fikcio. Do ni lasu ilin en propra limbo de tiuj verkoj, kiuj estas nek artaj nek sciencaj.

(daŭrigota)

# Libroj por infanoj: sed kia ilia lingvo?

Alvenis por recenzo libro el Ĉinio, kun belegaj bildoj kaj historio tute fantazia pri mirakla infano, magiistoj, drakoj, reviviĝo ktp.

Okdeko da grandaj koloraj bildoj resumas desegnitajn filmojn kun la sama titolo kiel la libro: *Nezha kirlas la maron*. Nezha estas la mirakla infano, kiu batalas kontraŭ la drakoj, pereas, sed estas revivigata kaj fine venkas ilin. Estas malfacile resumi libron, kiu en si mem estas tre drasta resumo de longa filmo.

Belegaj estas la ilustraĵoj, kaj tre malmulta teksto akompanas ilin. "Bonege!" mi pensis. "Jen io taŭga por Janko, kiu ŝategas legi librojn, tio estas rigardi ilin kun sia patrino aŭ patro, kiuj legas al li la tekston." Kelkajn librojn li jam preskaŭ parkeras. Tiun ĉi libron ne. Infano ne komprenas ĝin. Mi kredas, ke ankaŭ infano pli aĝa ol Janko malfacile farus el ĝi sian favoriton. Pri tio kredeble iom kulpas la temo mem (drakoj, superheroj, bataloj), parte la lingvaĵo de la libro. Ĝi estas korekta, sed ne tia, ke infano povas sekvi ĝin; eĉ ne esperantisto plenkreska, sed ne plene reganta esperanton. Tio igis min konkludi, ke ĝi ne estas libro, kiu direktas sin al infanoj.

Sed vi volonte havigu ĝin. La ilustraĵoj estas eminentaj kaj la malmultan tekston vi certe iom post iom komprenos.

\* \* \*

Tiu libro igis min rigardi la lingvaĵon de aliaj infanaj libroj, kelkaj relative malnovaj. *Ĉion faru mem ni ĉiuj* estas ankaŭ ĉina libro. Ĝi aperis en 1979 kaj temas pri eta knabino kaj ŝiaj okupoj dum la mateno. La bildojn akompanas nerimitaj versoj (kvar po bildoj), kiuj priskribas la bildojn: per simplaj vortoj, tute konkretaj. Kaj la elekto de temoj (ĉiutagaj objektoj kaj agoj) kaj la prezento faras ĝin tute taŭga infana libreto.

Ankoraŭ alia ĉina libro, el 1964, similas stile al ĉi tiu, *Bela Konvolvulo*, kiu temas pri koloroj kaj bestoj kaj kelkaj kreskaĵoj en la naturo. Tute ĉarme, tute facile. Ambaŭ libroj enhavas vortojn, kiuj estas novaj je la unua legado, sed tiel devas esti, ĉar ion oni devas lerni. Sed la vortoj estas prezentitaj en lingvaĵo rekta (relative) kaj komprenebla.



Mi ankaŭ rigardis la lingvaĵon de eŭropa klasikulo, *Hans-fuŝulo* de HC Andersen (ĝi troviĝas en *La novaj vestoj de la imperiestro*). La lingvaĵo en tiu rakonto fluas kiel se ĝi estus originala en esperanto. La frazoj estas longaj, sed kompreneblaj. Mi montru per kelkaj ekzemploj, prenintaj ie ajn en la libroj, kial mi opinias iujn librojn por infanoj facilajn, aliajn ne.

El *Hans-fuŝulo*: "Nun venis tiu el la fratoj, kiu sciis la leksikonon, sed ĝin li tute forgesis pro la starado en vico, kaj la planko knaris kaj la plafono estis el spegula vitro, pro kio li vidis sin mem kapstari, kaj ĉe ĉiu fenestro

staris tri skribistoj kaj unu plejaĝulo, kiuj enskribis ĉion, kion oni diris, por ke tio tuj aperu en la gazeto por esti vendata ĉe la angulo por du moneroj."

Kaj jen ekzemplo el *Bela konvolvulo*: "La konvolvulo deziris doni al fraĵo Rano la sesan gemon — la bluan. Fraĵo Rano kvakis: 'Dankon! Vidu, kiel bele verda mia haŭto jam estas. Mi povas facile kapti insektojn en verdaj kampoj. Por mi la blua gemo ne estas bezonata.'"

Kaj el *Ĉion faru mem ni ĉiuj*: "Glate kombas mi l'hararon / kaj ornamas ĝin per floro. / Al spegulo mi ridetas. / Ĝi respondas al mi same."

Kaj jen ree al *Nezha kirlas la maron*: "Nezha atingis la Ĉielan

Palacon ja pli frue ol la Drako-reĝo kaj, sin kaŝinte en la buŝo de kupra besto, kolere riproĉis la Drako-reĝon, ke li, anstataŭ esti akuzita faris akuzon kontraŭ aliuloj. Aŭdinte tion, la Drako-reĝo ektimiĝis. Sed tuj post kiam li trovis Nezha parolanta, li rekaptis la kuraĝon kaj kalumniis, ke Nezha estis kontraŭ la ĉiela leĝo kaj ke li profanis la Ĉielan Palacon per la krimigo."

Infano kapablas sekvi la longajn frazojn de *Hans-fuŝulo*, ĉar ili estas klaraj, dum la multaj -inte kaj -ante de *Nezha* malkomprenigas ankaŭ la simplaĵojn de la libro.

Franko Luin

# Memorbildoj pri semajnfino en As Vig

Ĉu vi iam partoprenis la semajnfajnajn kursojn en As Vig ĉe la dana marbordo kelkajn kilometrojn for de Horsens? Se ne, anoncu vin al la venonta aranĝo, kiu okazos en septembro; ĉar dufoje jare, printempe kaj aŭtune, Lizzie Egholm aranĝas kursojn tie. Vi certe ne pentos tion.

Mi partoprenis la kurson la 8an, 9an kaj 10an de majo kaj havas nur laŭdon. Mia nura kritiko estas, ke ĝi ne daŭris pli longan tempon, pro la vojaĝo, kiu estis, por mi, iom longa. Kun mi estis grupo de esperantistoj el Kungälv kaj Göteborg, por kiuj la kursoj estis tre taŭgaj. En la grupo estis kaj komencantoj kaj lingve pli spertaj esperantistoj. Eĉ partoprenis 3-jara knabineto, ĉar As Vig estas ideala loko ankaŭ por infanoj; do tuta familio povas kune partopreni.

Proksimume 50 personoj sekvis la kursojn, kiuj estis dividitaj en diversajn grupojn. Apud la danoj kaj svedoj troviĝis tie ankaŭ germanoj kaj unu aŭstraliano.

Lizzie Egholm sperte kaj vigle gvidis la infanan grupon. Partoprenis en ĝi deko da diversaĝaj infanoj. Ili donis pruvon pri sia lernado la sabatvesperon, kiam ili ludis mallongajn skeĉojn. La infangrupo de Århus tamen jam pli frue estis ekzercinta sian rolon kaj pro tio pli libere parolis.

Nur malmultaj estis komencantoj. Gvidanto por ili estis Georg Kustos. Lia maniero instrui diversajn gramatikerojn estis facile komprenebla kaj li bone paroligis la partoprenantojn.

Poul Jørgensen havis la taskon gvidi la konversacion inter tiuj, kiuj pli bone konis la lingvon. Li elektis frazojn el leteroj kaj la esperantotekston en la dana fervoja horaro por siaj diskutoj. La partoprenantoj devis proponi proprajn ideojn pri pli bonaj esprimoj kaj ekestis kelkfoje sufiĉe vigla argumentado por unu aŭ alia propono.

Tadeo Ilow, pola aŭstraliano,

gvidis la debaton en la lasta grupo. Ĝi temis pri la cirkonstancoj en Aŭstralio kaj por la indiĝenoj kaj por la enmigrintoj.

Dum la vesperoj estis aranĝitaj kursoj de alia speco, sed same popularaj, nome kursoj de popoldancoj. Dancinstruisto estis Christian Lauridsen el Ålborg. Li dancigis ĉiujn kaj lasis eĉ ne unu ĉemizon aŭ bluzon seka. Post du-tri dancoj ĉiuj abunde ŝvitis,

## Marŝas por paco kun esperantoflago

La 8an de marto, la internacia virina tago kelkcent personoj marŝis en Kungälv de Nordmanaplaco ĝis la lernejo de Thorild. Antaŭ ili flirtis la UN-flago kaj la esperantoflago.

Plej multaj marŝantoj estis virinoj. La banderoloj kaj parolhoroj postulis pacon kaj malarmigadon en la mondo.

La esperantoklubo de Kungälv kuniris kaj kontribuis al la tuta programo per kelkaj el siaj membroj (Reine Svensson kaj Yvonne Nordin).

En la marŝo partoprenis ankaŭ la parlamentano Evert Svensson, kiun la svedaj esperantistoj renkontis jam dum la jarkongreso de SEF, kiu okazis en Kungälv. Li rakontis post la marŝado, ke li laboras en laborgrupo, kiu kon-

sed Christian estis senkompata. Ni devis daŭrigi. Kaj ni volonte obeis. Kiam ni ne plu havis fortojn por danci, ni daŭrigis la kunestadon kantante laŭ la akompano tirharmonika de Gunnar Olsson el Skövde.

Mi eble aldonu, ke ni ĉiuj laboris en la kuirejo laŭ skemo bazita je la grupoj kaj ke la tuta restado estis tre malmultekosta, kvankam ni ricevis abunde da manĝaĵo. Per tio mi peris bildon de la kursoj en As Vig al vi, sed ĝi neniam povos esti kompleta sen via persona vizito. Vi ankaŭ sciu, ke Lizzie ĉiam mendas belan veteron por siaj aranĝoj, por ke oni povu ĝui la restadon ĉe la maro. Same ŝi faris ĉifoje.

Märtha Andréasson

sistas el personoj apartenantaj al diversaj religiaj organizaĵoj kaj kun malsamaj politikaj opinioj. Ili laboras i.a. por ke almenaŭ unu dekonon de procento de la sumo, kiu estas uzata por militistaj elspezoj, estu dediĉata al porpaca laboro. Nun nur 4 milionoj iras al tiu celo.

Evert Svensson estas prezidanto de la kristana organizo de la socialdemokratoj. En sia jubilea, 50-jara, kongreso ili decidis labori por paco kaj malarmigo.

Evert Svensson havas bonan sperton pri malarmiga laboro, ankaŭ je internacia nivelo. Dum tri jaroj li okupis sin per malarmigaj demandoj en UN, kiel membro de la unua komitato. Li atentigis, ke en la UN-debatoj oni multe parolas pri la armigfrenozo de la mondo; sed poste eble la reprezentantoj de la samaj landoj iras hejmen kaj altigas la armigkoston.

Nur tre postulema publika opinio povas ŝanĝi tion. Tio estas lia opinio. Li donis plurajn ekzemplojn pri tio. La internacia esperantomovado povus fari multon kiel kreanto de opinioj, diris Evert Svensson. La internacia lingvo ja estas kreita por favori al paco kaj interkompreniĝo.

Märtha Andréasson





# TABULO

## RABATITA PREZO!

Havigu al vi ekspoziciafiŝojn por la aŭtuna informado pri esperanto. La afiŝserio ESPERANTO IDAG estas ankoraŭ havebla - por nuraj 50 kronoj. La "flava serio", kiu konsistas el 7 afiŝoj estas havebla por nur 20 kronoj. Mendu per pago al poŝta ĝiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

En la fama loko Karlovy Vary loĝas Josef Slezák, kiu revas pri korespondantoj en la Nordo. Do skribu al li. Jen lia adreso: Josef Slezák, PO Box 218, CS-360 21 Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakio.

Pri Milada Hacurová ni jam publikigis anonceton, sed la adreso estis nekompleta. Se vi deziras skribi al ŝi, preferu per bildkartoj, uzu la jenan adreson: Milada Hacurová, Štitného 9, CS-775 00 Olomouc, Ĉeĥoslovakio. Milada studas medicinon, estas 24-jara kaj povas korespondi pri tre interesaj temoj!

Alia ĉeĥino, kiu serĉas korespondantojn en Svedio estas Ludmila Pelcová, kies adreso estas Čkyně 73, Okr. Prachatice, CS-384 81. Ludmila estas 26-jara instruistino.

Dudekjara kaj ankoraŭ sen korespondamiko estas Jarmila Bílková, CS-439 23 Břevany 86, Okres Louny, Ĉeĥoslovakio. Ŝi deziras konatiĝi iom kun Svedio kaj la vivo ĉe ni. Cetere ŝi interesiĝas pri sporto kaj muziko kaj kolektas bildkartojn.

Kun svedo aŭ svedino ŝatus korespondi dr. Veselina Makaveeva, ul. Majden Kirov 1 A, BG-7012 Ruse, Bulgario. Ŝi estas 47-jara.

Ĉu iu havas kompletajn jarkolektojn de NORDA PRISMO, precipe el la unuaj jaroj, kaj povus pruntedoni aŭ vendi ilin al mi. Mankas al mi unuopaj numeroj, ne tutaj jarkolektoj. Bv. respondi al Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö.

## Norrmän och svenskar träffas i Årjäng på gemensam kurs i september

Varje vår träffas danska och svenska esperantister på en gemensam *Sved-dana tago* — det har de gjort i årtionden. Svenska och finska esperantister träffas, i form av större gemensamma arrangemang, mera sporadiskt. Men de kommer att göra det i höst, i mitten av oktober. Lite tidigare, i slutet av september kommer en svensk-norsk träff till stånd: i **Årjäng**.

Den norsk-svenska träffen kommer att äga rum den 26 och 27 september i kursgården Kyrkerud och stugbyn Sommarvik och kommer att ha formen av en kurs, med start kl. 12.30 på lördag (med lunch) och avslutning söndag kl. 14.30.

Priset för mat, logi och själva kursen är 195 kr.

Man har tänkt sig att jobba i fyra grupper:

- litteraturkurs
- konversationskurs, medelsvår
- studiehandedarkurs
- ungdomskurs

Du kan anmäla dig redan nu; ja, helst så fort som möjligt. Det kan du göra genom att betala 195 kr till Esperantoförbundets postgiro 20 12-3, senast den 23 augusti. På talongen ska du ange, att det gäller kursen i Årjäng, vilken grupp du vill tillhöra och på vilket sätt du tänker ta dig till Årjäng (tåg/bil).

Om du åker tåg, välj följande tågförbindelse:

från Stockholm kl. 7.00. Du är framme i Årjäng, efter byte i Arvika, kl. 12.35;

från Göteborg kl. 11.00. Du är framme i Årjäng, efter byte i Mellerud, kl. 14.30.

Om du inte hinner till lunchen på lördag, får du pengar tillbaka — men meddela sånt i förväg!

Du kan åka hem på söndag kl. 15.25 mot Stockholm (och är framme 21.50) eller kl. 14.50 mot Göteborg (och är framme kl. 18.45). Kommer du från något annat håll, behöver du också veta dessa tider.

Börja hösten med en veckoslutskurs!

# JESÖNE

## Bokklubben stor succé

Bokklubben **Nova Libro** ser ut att bli en stor succé, säger Ulla Luin, en av dem som drog igång bokklubben. Den första boken, Johán Valanos *Ĉu li venis trakosme?* lockade tydligen många till klubben, med resultatet att den beställda upplagan tog slut och fick tilläggsbeställas. Det andra bokpaketet kommer snart att skickas till "klubbmedlemmarna"; det kommer bestå av två mindre böcker, båda lättlästa.

Till bokklubben kan man anmäla sig när som helst, så vill du vara med, skicka ett kort med ditt namn till *Esperantoförlaget, Bokklubben Nova Libro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm*. Du får nästa bokpaket till påseende i 10 dagar.

## Femtio år i Falköping

Som vi nämnt i förra numret av *La Espero* har Falköpingsklubben firat 50-årsjubileum den 16 maj. Det firades med en liten festlighet på Bredablick som började kl. 15 på lördagseftermiddagen och höll på i fyra timmar.

Ett femtiotal personer hade mött upp trots eller tack vare det vackra vädret. Det var bl a kommunstyrelsens ordförande Erik Andersson, som gratulerade med blommor, det var representanter för närbelägna klubbar och för Esperantoförbundet och t o m en gäst från det avlägsna Australien.

Lennart Åberg höll högtidstallet och ett par journalister från Falköpings Tidning följde det

## Esperantoförbundets ekonomi 1980

### RESULTATRÄKNING 1980

Intäkter		Kostnader	
Medlemsavgifter	45 475.--	La Espero	29 554.69
Klubo Cent	3 620.--	Esperantonytt	14 241.85
Gåvor	3 299.50	Informationsfond	9 444.06
Ränta	2 538.40	EsperantoCentro	15 360.80
La Espero	9 481.89	Omkostnader	35 295.76
Esperantonytt	6 031.45	Överskott	
Informationsfond	22 544.56	Infond 13	100.50
EsperantoCentro	32 017.25	E-Centro 16	656.45
Övrigt	14 832.50	Resefond	315.--
---		Övrigt	5 871.44
	139 840.55		35 943.39
			139 840.55

### BALANSRÄKNING 31 DECEMBER 1980

Tillgångar		Skulder	
Kassa	2 339.90	Esperantoförlaget	1 656.35
Postgiro	32 773.30	Div. personer	15.--
Bank	29 560.60	Resefond	1 593.52
Div. personer	500.--	Informationsfond	29 955.75
Inventarier	10 629.20	EsperantoCentro	26 656.45
Ränta	1 789.40	UEA	8 849.61
Förutbet. kostn.	8 078.--	66-a UK	908.70
Esperantonytt	2 183.--	Maskinhyra	1 750.--
Hägervägen	4 000.--	Klubo Cent 1981	1 600.--
Värdepapper	3 580.70	La Espero 1980	3 404.40
---		La Espero 1981	457.--
---		Kapital	12 695.88
---		föreg. år	20.--
---		överskott	5 871.44
	95 434.10		18 587.32
			95 434.10

hela uppmärksamt hela tiden. Dagen efter fanns en stor artikel om jubileet.

Efter den högtidliga delen fick man landgång och öl som förtäring; sedan blev det allsång, solosång och dans.

## Sista numret för icke-betalande

Esperantoförbundets kassör, dvs Anita Lindblom, ber att påminna alla som ännu inte betalt avgiften för i år att göra det med detsamma. Detta gäller alla medlemmar, också de direktanslutna. Hon ber samtidigt alla kassörer att rapportera alla redan inbetalda avgifter.

Detta är annars det sista numret av *La Espero* som skickas till dem som inte betalt. För direktbetalande medlemmar finns uppgift om medlemsavgiften på tidningens andra sida. Du vill väl inte missa något nummer?

## Ŝanĝoj en la du plej grandaj kluboj

La du plej grandaj kluboj esperantistaj en Svedio, tio estas tiuj de **Malmö** kaj **Stokholmo**, ambaŭ ricevis novajn estrarojn ĉijare. En Malmö Jan Strönne lasis la prezidantan postenon, kiun li havis dum la lastaj sep jaroj (pli frue li estis prezidanto de la klubo dum 17 jaroj) al Sten Svenonius, kiu estis sekretario de la klubo ĝis la ĉijara elekto. En Stokholmo la prezidantan martelon transprenis Ingemar Nordin el la manoj de Sven Alexandersson, kiu svingis ĝin dum la lastaj jaroj. Ankaŭ aliaj estraranoj estas novaj en la du kluboj.

## Ranoj invadis Stokholmon

Ranoj invadis Stokholmon en marto kaj oni komencas rimarkiti tion. La ranoj pri kiuj temas estas la nova junulara grupo esperantista, kiu tute ambicie tuj eklaboris.

Ili prezentis sin dum pluraj popularaj aranĝoj en la ĉefurbo, ekzemple la granda kajtofestoj

en majo kaj la festivalo de la suda urbo. Tie ili starigis kun informbudo kaj vendotablo.

La ĉefa zorgo de la Ranetoj, kiel ili nomas sin, estas manko de mono por pagi siajn kostojn (informa materialo, papero ks).

Kelkcent kronojn ili iel perlaboris, ekzemple per vendado de bazaraĵoj.

La Ranetoj havas grandajn planojn; inter alie ili preparas novan lernolibron, kaj vortinstruan kartludon.

# PERSONE

## Kelkfoje oni forgesas pri sia antaŭa personeco

La alian tagon mi malplenigis tirkeston en ŝranko, kiun mi dum multaj jaroj ne malfermis. Mi kredas, ke tiu tirkesto neniam estis malplenigita de post kiam mi plenigis ĝin iam antaŭ deko da jaroj. Kaj ie inter ĉiuj neinteresaj paperoj (mi fakte miras, kial mi venis al la ideo entute ŝpari ilin) mi trovis ordinaran nigran kajeron, pri kies ekzisto mi tute forgesis.

Temis pri kajero, kiun mi uzis baldaŭ post mia esperantiĝo, antaŭ tuta amaso da jaroj. Mi rekonis la kajeron, sed ne la enhavon. Estis poeziaĵoj en esperanto, kiujn evidente mi tiam verkis.

Poezio estas io, kion mi ne toleras nuntempe. Fakte tio estas eĉ pli terura ol aŭskultado de opera kantado. Kaj jen mi trovas, ke mi antaŭ pli ol tridek jaroj verkis poeziaĵojn! Estas bonŝanco, ke mi ne ŝatas poezion, ĉar se mi estus poeziamanto, mi verŝajne ekplorus legante tiujn versojn, kiujn novbakita esperantistino produktis en sia verda (en duobla senco) junaĝo.

Anstataŭe mi sidigis kaj havis du plenajn horojn da bona rido. Troviĝis en tiu kajero la tuta flaŭro de poresperantaj kantoj: miaj propraj variaĵoj je *La lingvo por ni*, *Vivu esperanto* aŭ kiel ajn ili nomiĝas. Strange estas, ke ili iel fluas — kaj mi nuntempe eĉ ne povas skribi kristnaskajn rimojn por la donacoj al miaj du filinoj.

Mi miras, kio igis min skribi tiujn versaĵojn. Mi konas sufiĉe bone min mem: fantazion mi ja havas, sed mi prefere tenas min sur la tero kaj zorgas pri konkretaĵoj. Iu maliculo dirus, ke kun miaj dikaj kruroj mi ne kapablas fari alion ol teni min sur la tero. Povas esti. Sed kiam mi estis juna, mi evidente estis alia homo ol mi kredas min esti. Mi fakte ne komprenas, kiel mi tiel komplete forgesis pri tiu antaŭa mi.

Mi scias, ke miaj familianoj legos ĉi tiun skribaĵon kaj ke ilia unua postulo estos, ke mi montru al ili tiun kajeron. Por eviti, ke ili sukcesu persvadi min, mi forĵetis ĝin kune kun aliaj kuirejaj forĵetaĵoj kaj mi estas certa, ke mi neniam bedaŭros tion. Alian sorton ili ne meritis. Sed tiuj miaj versaĵoj havis la neatenditan efikon, ke mi komencis rigardi alies poeziaĵojn. Esperantan oni apenaŭ trovas en nia domo; nur en iuj antologioj ĝi estas trovebla. Sed tio sufiĉis por rimarki, ke oni povas elteni ankaŭ poezion. Kelkaj versoj eĉ sufiĉe plaĉis al mi. Ili tute malsimilis al miaj propraj, ĵus forĵetitaj.

Mi kredas, ke mi scias, kial mi malŝatas poezion (ĉu mi eble komencu skribi: malŝatis?): mi legis tro multe da versoj similaj al miaj, kiam mi estis nova esperantistino. Kaj ili certe daŭre abundas. Kial ne la aliaj "poetoj" faras same kiel mi: kaŝas siajn kajerojn dum kelkdek jaroj kaj nur post tiu tempo prijuĝu ilian kvaliton?


Eble mi estas tro negativa; sed se oni tiutempe estus montrintaj al mi bonajn verkojn, mi hodiaŭ rezonus aliel. Jes, ŝi pravas, Marjorie Boulton, en sia artikolserio pri la esperanta literaturo: nur per montrado de la bonaj verkoj oni povas igi iun profunde interesita. La balaĵoj (kiel tiuj miaj) donas eraran bildon pri esperanto.

Eta Mi

## Mitterrand lovar stödja esperantoförslag

Frankrike har fått en ny president, F. Mitterrand. Före valet skrev han följande till franska esperantister, som ville höra hans åsikt om esperanto:

"Mina parlamentariska vänner har i den föregående sessionen av nationalförsamlingen lagt ett lagförslag som syftade till att få det internationella språket esperanto med i utbildningen på högstadiet och i gymnasieskolan, som frivilligt ämne. Om fransmännen ger mig sitt stöd, kommer jag att be regeringen att lägga fram lagförslaget till parlamentet."



Så nu går man i Frankrike och hoppas på att han håller sitt löfte.

Samtidigt meddelas det från samma land att Francis Palmero, medlem av den franska senaten, lämnat till senaten ett lagförslag, som skulle, i likhet med lagförslaget i nationalförsamlingen, göra undervisning i esperanto möjlig i franska skolor. Enligt Palmeros förslag skulle esperanto inta status som frivilligt ämne; det skulle få förekomma på en skola så fort en grupp av elever, lärare eller föräldrar begärde det. Utbildningen av esperantolärare skulle ske vid universiteten.

## Ett frimärke från Brasilien



Brasiliens poststyrelse kommer att ge ut ett minnesfrimärke i samband med det internationella esperantokongressen som äger rum i Brasilia under juli i år. Flera gånger tidigare har Brasilien på detta sätt uppmärksammat det internationella språket.

## Lärobok i kemiska översättas

Under trycket av, framför allt, den nya esperantorörelsen i Iran, som kräver ett avsevärt utökad utbud av tekniskvetenskaplig litteratur på esperanto, har USAs esperantoförbund (ELNA) uppdragit åt några av sina medlemmar att översätta en nytgiven grundbok i allmän, organisk och biologisk kemi. Man räknar med att boken kommer att finnas på esperanto år 1983.

## Allt aktivare i Havanna

Radio Havana på Kuba har börjat sända en esperantokurs varje söndag. Samma dag publiceras denna kurs i en av huvudstadens tidningar. Den starkt ökande esperantoverksamheten återfinns man också på riksplanet: Kubas Esperantoförbund, ganska nystartat, kommer att ha sin första kongress i augusti i år.

ESPERANTONYTT  
REDIGERAS AV STEN ÖFORS  
OCH FRANKO LUIN

## De tio största: idag och år 2000

Redaktionen för UEA-publikationen *UN kaj ni* (FN och vi) har gjort en sammanställning över de tio största språken i världen idag och, med hjälp av befintliga födelsetalsprognoser, en projicering till år 2000.

### ÅR 1978

01	kinesiska	863
02	engelska	350
03	ryska	262
04	hindi	255
05	spanska	234
06	indonesiska	145
07	arabiska	126
08	portugisiska	125
09	bengaliska	123
10	japanska	115

### ÅR 2000

01	kinesiska	1300
02	spanska	420
03	engelska	400
04	hindi	370
05	ryska	320
06	portugisiska	260
07	indonesiska	230
08	arabiska	200
09	bengaliska	185
10	japanska	128

Siffrorna är i miljoner talande. Om man räknar ihop språken hindi och urdu, som liknar varandra men har olika skrivsystem, blir hindi-urdus ställning år 1978 det tredje största språket med 330 milj. och år 2000 det näst största språket med 465 miljoner talande.

År 2000 intar engelskan inte längre ställningen som tvåa, p g a de spansktalandes snabba tillväxt.

Indonesiska är det officiella språket i Indonesien, kallat "bahasa indonesia", känt under namnet "det malajiska språket"; det särskiljs här från Malaysias malajiska språk, "bahasa malaysia". Även om vi räknar ihop dem båda, ändras inte ordningsföljden.